Aprilo 1960 Jarkolekto 57 - No. 501

ESPERO KATOLIKA

ORA JUBILEO DE I.K.U.E.

Kvankam nia revuo ESPERO KATOLIKA ekzistas ĉirkaŭ 57 jarojn, la INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA, kies organo ĝi estas, nur nun festas sian 50-jaran jubileon. E.K. ja estis fondata en 1903 de *Abato Emile Peltier,* kiu en sia lasta malsano aranĝis, ke redakcia komitato transprenu lian laboron por garantii la pluan ekzistadon de nia revuo; en E.K. januaro 1909 tiu decido estis publikigata: en la sama numero aperis sciigo, ke ek de 1.3.1909 ekzistos „Katolika Esperantista Oficejo, Propagandejo kaj Konsulejo" en Parizo, kie oni deĵoros regule la tutan tagon.

Abato Peltier mortis 17.2.1909, sed la daŭrigo de lia vivlaboro estis garantiata, ĉar la Redakcia Komitato jam funkciis sub gvidado de s-ro *Claudius Colas.* En septembro de la sama jaro okazis en *Barcelono, Hispanujo,* la kvina „Internacia Kongreso de Esperanto", dum kiu estis diversaj S. Mesoj kun predikoj en Esperanto kaj kunvenoj por la katolikaj kongresanoj. Dum tiuj kunvenoj oni konsideris, ke „pro la kreskado de la Esperanto-movado inter la katolikoj... kaj precipe pro la graveco de Esperanto por la katolikismo... okazu ĉiujare speciala kongreso internacia de katolikoj, en kiu estos internacie traktataj en Esperanto ĉiuspecaj demandoj religiaj, filozofiaj, socialaj, aŭ praktikaj, kiuj interesas la tutmondan katolikaron" (E.K. 1909, 17). Ankaŭ oni decidis al starigo de „Katolika Unuiĝo Esperantista" kaj kompilis provizoran regularon, ĉio laŭ proponoj de *Patro A. Dombrowski* el *Kovno (Rusujo),* kiu pro la por tiu tempo grandega distanco ne povis ĉeesti.



REMEMORAĴO
DE LA DUA JARFESTO JE L'HONORO
DE LA
SANKTA VIRGULINO DE L'ESPERO
okazigita en
Sabadell kaj Barbará del Vallés
la 21-an Decembro 1913-a
de *Kataluna Katoliko*
Katolika Stelo kaj *Esperanta Nesto*
predikis
Dro. Jozefo Casanovas, Ptro
dediĉita
al pia memoro de Abato Aŭstin Richardson, Prezidinto de I K U E, mortinta en Bossey apud Genevo la 21-an de Aŭgusto.
(E Ĉ P R.)

Abato Austin Richardson el *Bruselo* estis elektata provizora prezidanto. Oni ankaŭ proponis, ke en ĉiu lando estu starigata nacia societo kiel sekcio de K.U.E. La provizora regularo aperis en E.K. nov. 1909 kun peto, ensendi rimarkojn kaj kritikojn, ĉar la afero estu definitive aranĝata dum la *Unua Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj* de 30.3 - 3.4.1910 en *Parizo.*
Post tiuj preparoj nia Unuiĝo estis oficiale fondata en *Parizo, la unuan de aprilo 1910,* kaj *Abato Richardson* estis la unua Prezidanto. Dum la preparoj oni do parolis pri K.U.E., dum la unua kongreso de I.K.E.U., sed la definitiva regularo portis kiel surskribon la oficialan nomon: INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA (I.K.U.E.). Kompreneble oni de tiam kelkfoje devis ŝanĝi la Regularon, sed la nomo I.K.U.E. ĉiam restis la sama.
Nia Unuiĝo travivis tempojn de progreso kaj de regreso, du mondmilitojn, kaj aliajn gravajn batojn: post la unua mondmilito *ESPERO KATOLIKA* denove aperis en Aŭstrujo, sed tiea „diktatoro" alproprigis ĝin kiel organon de „Internacio Katolika", forŝovante IKUE kaj ties prezidanton — post la morto de Abato Richardson en aŭgusto 1913 oni elektis prezidanto *Sac. Patrick Parker, Irlando* — sed pri tio la plej granda parto de la IKUE-aro protestis kaj la agado de *IKa,* kiu cetere ne akiris la eklezian aprobon, baldaŭ devis malaperi kaj IKUE povis repreni siajn rajtojn. Mi ne scias ĉu Sac. Patrick Parker ankoraŭ vivas, sed supozas ke li intertempe mortis: en 1939 mi renkontis lin en Irlando kaj tiam li havis jam pli ol 70 jarojn. (Kiu povas informi nin pri detaloj?)
Unu el la plej akraj kontraŭbatalantoj de la IKa-diktatoro estis S-ro *P. A. Schendeler, Nederlando;* post mallonga provizora prezidanteco de parohestro *L. J. J. M. Poell, Nederlando,* anstataŭanto de sac. Parker, kiu pro la tiamaj teruraj cirkonstancoj en Irlando ne povis plenumi sian funkcion, s-ro Schendeler estis elektata prezidanto de IKUE en aŭgusto 1921, kaj funkciis ĝis 1924, kiam *Sac. Francisko Meŝtan, Aŭstrujo* transprenis tiun postenon. Ambaŭ intertempe mortis antaŭ kelkaj jaroj. En 1928 sekvis *Sac. Prof. J. Font Giralt, Hispanujo;* li restis prezidanto ĝis li estis murdata dum la enlanda milito en sia patrujo.
En novembro 1935 s-ro *P. Heilker, Nederlando* transprenis la prezidantan martelon; li plenumis sian postenon ĝis 1949. Antaŭ la milito li sciis gvidi nian Unuiĝon per forta mano, tiel ke IKUE multe progresis: post la katastrofo li helpis restarigi la ruinojn por denove ekmarŝigi nian Unuiĝon. Ankoraŭ nun, 77-jara, li havas grandan intereson por nia IKUE, kies membro li estas de la komenco, do jam dum 50 jaroj. En tiu sama jaro 1909 li estis kunfondinto de la plej granda IKUE-sekcio „Nederlanda Katoliko". Al la jubileanto, kiun mi malgraŭ li aĝo absolute ne povas nomi „maljunulo", plej korajn gratulojn kun bondeziroj por ankoraŭ multaj jaroj en bonega sano!
Sekvis la nuna prezidanto, parohestro *Alphons Beckers, Belgujo,* al multaj IKUE-anoj persone, kaj al ĉiuj almenaŭ laŭ la nomo kaj foto konata.
Mi povis nur doni tre rapidan supervidon pri nia movado kaj invitas la veteranojn, ke ili ensendu se eble priskribon de jam preskaŭ forgesitaj okazintaĵoj, anekdotojn el la vivo de nia IKUE, kiuj povus interesi la nunajn membrojn.
Kaj ni ĉiuj preparu belan donacon al nia jubileanta Unuiĝo: antaŭ ĉio per fervora preĝo, ke Dio benu nian laboron; plue per varbado de multaj novaj membroj, kaj se eble ankaŭ per mondonaco, por ke nia organo, *Espero Katolika,* fariĝu ĉiam pli bela, pli ampleksa kaj pli interesa!

Truus Durenkamp,
ĝenerala sekretariino de IKUE.

Kvara Mondkunveno

de katolikaj esperantistoj en la kadro de la

XXXVIIa EŬKARISTIA MONDKONGRESO en MUNKENO

de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 1960.

Deka Bulteno de la L.K.K.

Nun ni ricevis de la loĝeja komitato de la Eŭkaristia Mondkongreso la definitivan informon, ke ili donos al ni la lokon *Gräfelfing,* 12 km for de Munkeno, kiel kongresan kaj loĝejan lokon, en kiu troviĝas sufiĉe da privataj ĉambroj kaj amasloĝejoj malmultekostaj. Ĉar ni ne jam povis anonci al la komitato la precizan nombron de niaj partoprenontoj, sed lastjare nur takse diris eble 600, oni nun rezervis al ni 1000 ĉambrojn kaj amasloĝejajn lokojn kun la peto, sciigi al ili ĝis la 15-a de aprilo la definitivan nombron da ĉambroj bezonotaj kun samtempa pago. Do estas *urĝega devo,* se iu volas ankoraŭ aliĝi kaj mendi ĉambron, tion *tuj* fari kaj sendi kotizon kaj pagon de 6 gmk. por ĉiu nokto por la ĉambro. *Post la 15a de Aprilo ni ne povos plu akcepti aliĝojn.* Gesamideanoj, kiuj malgraŭ tio venos al la kongreso, faros tion je propra risko kaj devos mem serĉi tranoktejon. Ni ofte alvokis je baldaŭa aliĝo kaj estus por ni bona propagando, se ni jam nun estus povintaj anonci al la komitato 600 kaj pli da esperantistoj, kiuj vizitos la kongreson!

Intertempe estas publikigitaj la planoj por la konstruaĵoj sur la festejo, la *Teresa-herbejo.* En la mezo de tiu ĉi giganta herbejo estos konstruata ronda „altar-insulo", alta 10 metrojn kaj havanta diametron de 84 metroj. Super la altaro estos stelsimila baldakeno kun diametro de 34 metroj. En la ejoj sub la altaro troviĝos la sakristio, sanitarista centro, gazetaro, radio kaj televido. Oriente de la altaro oni konstruos 70 metrojn longan kaj 7 metrojn larĝan ponton por la filmado kaj televidado, por ke la tuta mondo almenaŭ okule povu partopreni la sanktajn solenaĵojn.

Ĉirkaŭ la altaro estos konstruataj sidlokoj por 468000 personoj. Plue estos starlokoj por 460000 kongresanoj. Pro la alteco de la altaro oni povos vidi la solenaĵojn de ĉiuj flankoj.

Por la lasta tago de la kongreso, la 7a de aŭgusto, 110 specialaj trajnoj alportos inter la 3a - 9a horo 200000 homojn al Munkeno, do ĉiun 3an minuton alvenos speciala trajno, krom la regulaj trajnoj laŭ la horaro. Proksime al la Teresa-herbejo estos instalataj du provizoraj stacioj. Laŭ kalkulo en unu horo 320000 homoj povos veni sur la festejon, de la tuta herbejo estos plenigita per 1 miliono da vizitantoj en ĉirkaŭ 3 horoj!

La tuton oni reguligos per katenbalono super la festejo. Por ordigi la trafikon sur la aŭtostratoj, oni uzos helikopterojn.

Ni pensis, ke por niaj gesamideanoj certe estas interese, ekscii ankaŭ ion pri la gigantaj antaŭlaboroj kaj problemoj, antaŭ kiuj estas metita ne nur la ĝenerala kongreso, sed se ankaŭ en pli malgranda formo la komitato de nia Esperantista Mondkunveno. Kaj vi povos faciligi al ni la laboron per *tuja aliĝo!!*

Ĝis la 10-a de marto anoncis sin 152 parteprenontoj el 12 landoj: Aŭstrujo 10,

Anglujo 1, Belgujo 4, Brazilo 1, Francujo 10, Germanujo 83, Hispanujo 11, Italujo 4, Nederlando 20, Polujo 6, Jugoslavio 1, Irlando 1. Inter ili estas 20 sacerdotoj.

KATOLIKAJ ARANĜOJ DUM LA 45-a UNIVERSALA KONGRESO EN BRUSELO

Dimanĉo 31.7.60: Sankta Meso en la katedralo de S. Gudula je la 17-a h. Celebros: Sac. *Edmond Rohen,* profesoro de la seminario en *St. Truiden,* kiu ankaŭ predikos pri: *La Universala tasko de la Eklezio.*
Marde aŭ merkrede, je horo fiksota de la konstanta kongres-sekretario: sekcia kunveno por la katolikoj. Prezidanto de tiu kunveno estos s-ro *Rik de Roover,* sekretario s-ro *Hector Vermuyten.* S-ro *Rik de Roover* prelegos pri: *La Internacia Katolika Laborista Junularmovado (J.O.C.).*
La kunveno daŭros proksimume 3 horojn kaj verŝajne ĉeestos proks. 300 personoj. Eble tuj antaŭ la dimanĉa Meso la katolikaj samideanoj estos akceptataj de *Msro. Forni,* apostola Nuncio en Belgujo, kiu pontifike ĉeestos dum la sankta Meso en la katedralo.
Detaloj sekvos en la kongreslibro.

* *
*

Pro spacomanko ni ne povas publikigi ĉiujn detalojn pri la 45-a U.K. en Bruselo: aliĝintoj cetere ricevos ilin rekte de la LKK. Ni nur volas mencii ke okazos laŭkutime oratora konkurso, diversaj fakkunvenoj, ekskursoj, junularkunvenoj, infana kongreseto, postkongreso, ktp.
Ĝis la fino de februaro anoncis sin 1057 kongresanoj el 36 landoj.
Interesa novaĵo estas la SONBENDA PROGRAMO: L.K.K. preparis 34-minutan sonbendan programon kun belga (flandra kaj valona) muziko, mesaĝo de la Prezidanto de la L.K.K., parolado de la K.K.S. kaj oficiala invito de la Urbestro de Bruselo. La sonbendo estas senpage mendebla ĉe la kongresa oficejo flanke de lokaj Esperanto-societoj regule aliĝintaj al Landa Asocio.
Adreso: *45-a Universala Kongreso de Esperanto, Bruselo, Belgujo.*

Antaŭkongresa renkontiĝo okazos de 27 - 30.7 en *Arnhem, Nederlando.* Aliĝoj kaj informoj ĉe la Sekretario, Pontanuslaan 7, *Arnhem, Ned.*



Sac. H. Zimmerer, Oberzier, Germanujo mortis en februaro pasinta, laŭ indiko de resendita E.K.-numero. Ek de 1951 li estis IKUE-ano. *
Laŭ sciigo de la edzino mortis meze de februaro nia membro s-ro *Karlo Haug,* ĉefstudkonsilisto en *Sigmaringen,* Germanujo. *
Nur nun ni eksciis, ke la 29.11.59 mortis kuracisto *Antonio Porta Gárate* en *El Ferrol del Caŭdillo, Hispanujo,* kiu dum multaj jaroj fervore laboris por nia movado en sia urbo. *
En la aĝo de 54 jaroj mortis post longtempa nervmalsano sac. Louis Vandepitte en la Instituto Sankta Kamilo, *Bierbeek,* Belgujo.
Ni kondolencas la parencojn kaj preĝas por la ripozo de iliaj animoj.

La 21-an de aprilo estos oficiale inaŭgurata la nova ĉefurbo de *Brazilo: Brasilia*. Okazos grandiozaj solenaĵoj, dum kiuj finiĝos la longa pilgrimvojaĝo de du statuoj, nome de la sankta Koro de Jesuo kaj de sankta Francisko, donaco de la katolikoj en *Milano, Italujo,* al siaj samkredanoj en la brazila ŝtato *Ceará*. La bildoj antaŭ du jaroj estis benataj de Papo Pio XII, kaj intertempe pilgrimis tra la tuta Brazilo. De la urbo *S. Paŭlo* ili ankoraŭ unu fojon estos portataj al *Ceará* per militista aeroplano, kaj de tie al *Brasilia*. *

En *Stokholmo, Svedujo* dum la lasta tempo okazis ĉiusemajne diversaj publikaj kunvenoj kun prelegoj kaj debatoj pri punktoj de la katolika doktrino, al kiuj ĉeestis resp. partoprenis multaj personoj. Estas mirinda fakto, ke en tiu lando, kie 99% de la loĝantaro estas luteranoj kaj nur 35.000 konfesas la katolikan religion, en la lastaj jaroj regas forta ondo de simpatio por la katolikismo en grandaj sektoroj de la popolo. *

Okaze de sia 25-jara ekzistado, la komerca entrepreno „Fratoj Robledo" en *Bogotá, Kolombio,* donacis unu milionon da pesoj kiel unuan kontribuon por la fondo de „Kolombia Fonduso por Sacerdotoj". Tiu fonduso volas kontribui al la apostolaj laboroj en Kolombio, helpante la akiron de pli multnombra, eminenta sacerdotaro, altirante valorajn profesorojn por la seminarioj, fondante bibliotekojn kaj multajn studkasojn por seminarianoj kaj financigante kampanjon por instigi reliĝiajn vokojn. *

En la urbeto *Ballinahinch,* Irlando, je la marbordo de *Galway,* ekzistas anglikana preĝejo. Ĉar tamen en tiu regiono loĝas preskaŭ neniu membro de la anglikana eklezio, ties aŭtoritatuloj opiniis, ke la preĝejo povos fari pli bonajn servojn al la konstante kreskanta nombro da katolikoj kiuj devis iri grandan distancon por viziti preĝejon ekster sia komunumo; kaj tial donacis la preĝejon en vere kristana solidareco al la lokaj katolikoj. *

Ni ĉerpis ĉi tiujn informojn el la bulteno de la Presagentejo „Mondo Migliore", Romo.

GRAVA ALVOKO

La mondfama firmo PHILIPS, kiu en siaj diverslandaj fabrikoj (184.000 laboristoj kaj oficistoj) produktas elektrajn lampojn, radio- kaj televido-ricevilojn kaj centojn da aliaj elektraj aparatoj, intencas presigi informajn presaĵojn en Esperanto por dissendo al esperantistaj medicinistoj en la tuta mondo. Por tiu celo la Direkcio de la *Sekcio por Medicinaj Aparatoj* en *Endhoven* deziras ricevi kiel eble plej multajn *adresojn de esperantistaj medicinistoj* de ĉiuj fakoj (profesoroj, kuracistoj, flegistoj, studentoj, farmaciistoj, vendistoj de medicinaj aparatoj ktp., de ambaŭ seksoj).

Ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo estas petataj kunhelpi por ĉi tiu grava praktika apliko de Esperanto, sendante taŭgajn adresojn al: *Internacia Esperanto-Instituto,* Riouwstr. 172, *den Haag, Nederlando,* kiu kompilos la adresaron kaj helpos ĉe la dissendo de la presaĵoj.

LA SANKTA KALIKO DE LA VESPERMANĜO

Tiu ĉi artikolo estas grandparte ĉerpita kaj ofte laŭlitere tradukita el hispana broŝuro de D-ro Elias Olmos Canalda, Kanoniko-arkivisto de la Baziliko de Valencio, Hispanujo. Tradukis: D-ro Ernesto Tudela, Valencio.

La familiestro.

La interpretistoj de la Sankta Skribo diskutas pri la „familiestro" en Mk 14, 12-16 kaj Lk 22, 9-13, kiun Jesuo indikas por festi la lastan Vespermanĝon en ties hejmo. Ili konsentas, ke li estas disĉiplo de Jesuo, kaj inicita al la diaj Misteroj (laŭ Mt 26, 18), tamen ne akordiĝas pri „kiu estis li". Pluraj certigas, ke li estas *Ĥuso,* prokuristo kaj kasisto de Herodo Antipo (Lk 8, 3), kaj edzo de *Johana,* unu el la piaj virinoj sekvantaj la Majstron, kaj kiu donaceme nutris la apostolojn, kion ŝi ne estus povinta fari, se ŝia edzo ne estus konsentinta.
Ĥuso estis riĉa, kaj li povis oferi sekuran rifuĝejon al Jesuo, kiu estis gvatata de siaj malamikoj, ek de la Palmofesto, kiam ili akordiĝis por Lin mortigi. En malpli sekura loko la skribistoj kaj la fariseoj eble ne estus permesintaj ke Jesuo Kristo estus celebrinta trankvile la Paskon kun siaj apostoloj.
Post la mortigo de la Savanto la apostoloj sin kaŝis eble en la *Cenaklo* (Sankta Manĝejo), ĉar ili timis la Judojn, kaj tio pruvas la sekurecon de la hejmo de la familiestro. Oni povas facile kompreni, ke neniu kiel la administranto de Herodo Antipo povis oferi tiel sekuran ejon al Jesuo por celebri la leĝan kaj la Eŭkaristian Vespermanĝon, kaj al la apostoloj por sin sekurigi kontraŭ la Judoj.
Tiel, post simpla peto de Petro kaj Johano, ĉiuj povis kunveni je la vespermanĝo de la tago de la azimoj, por festi la Paskon kaj la S. Eŭkaristion, kaj same kiel li pretigis la gastoĉambron por tiel gravega soleno, li sendube zorge kaj pie konservis la Kalikon, kiun la Dia Majstro uzis por trinki sian propran Sangon, kaj per kiu ankaŭ trinkis Ĝin la disĉiploj je tiu memoriginda vespero.
Kompreneble la apostoloj delikate prizorgis la Kalikon de la Unua Meso, same kiel ili konservis aliajn gravajn objektojn: la tablon de la Lasta Vespermanĝo, la najlojn de la Krucumo, la Sanktan Tukon, la Dornan Kronon kaj la Tombon mem.



La Kaliko en Romo.

Oni scias, ke en la unuaj jarcentoj de la Kristanismo nur celebris la S. Meson la papo en Romo, kaj la episkopoj en siaj diocezoj. Kaj de Romo mem oni prenis la vortojn, kiujn prononcas la sacerdoto antaŭ ol konsekri la vinon, nome: *„Li prenis ĉi tiun altvaloran Kalikon en siajn sanktajn kaj respektindajn manojn, ĝin benis kaj donis al siaj disĉiploj dirante: PRENU KAJ TRINKU...."*
Kiun aludis la papo? Nur povis esti Jesuo mem, kiu tenis en siaj manoj je la Vespermanĝo la sanktan Kalikon, kiun en siaj manoj tenas la Pontifiko, kiam li prononcas la cititajn vortojn. Se tiu kaliko ne estus estinta la Eŭkaristia, sendube li estus dirinta: „Li prenis *la* kalikon",

sed ne *ĉi tiun* Kalikon, same kiel li diris „Tiu prenis panon", kaj ne *ĉi tiun* panon. Verŝajne estis jam sankta Petro, kiu adoptis tiajn frazojn antaŭ ol konsekri, por memorigi la instituon de la Eŭkaristio.
Pluraj aŭtoroj konsentas, ke S. Petro portis la S. Relikvon al Romo kaj uzis ĝin ĝis sia morto, same kiel faris la postaj papoj ĝis Sikso II. Se do oni pruvas, ke la kaliko en Romo uzita de la papoj ĝis la jaro 258 estas la sama, kiun oni transportis al *Valencio,* oni evidentigas la aŭtentikecon de tiu, kiun ni ĝis nun honoras en la valencia katedralo.

Transporto al Hispanujo.

Antaŭ sia martiriĝo *Siksto II* transdonis la S. Kalikon al sia diakono *S. Laŭrenco.* Kiam la imperiestro *Valeriano* persekutis tiun ĉi, li transdonis la S. Kalikon kun letero al roma soldato, du tagojn antaŭ sia martiriĝo, kaj tiel sendis ĉion al la hispana urbo *Huesca,* kie li estis naskiĝinta, ĉar la persekuto estis tiam en Hispanujo malpli severa ol en Romo.
Laŭ konstanta tradicio de la aragona regiono kaj atestoj de pluraj aŭtoroj, la S. Kaliko estis honorata en *Huesca,* kaj poste en *San Juan de la Pena* (S.Johano de la Roko), kien ĝi estis transportata en la jaro 713, du jarojn post kiam la Islamanoj invadis Hispanujon, kio devigis *Adalberton,* Episkopon de Huesca, rifuĝi en la cititan lokon kune kun granda nombro da kristanoj de sia diocezo. En tiu tempo *S. Johano de la Roko,* kaŝita en la arbaro de la monto *Pano* (Pirinea montaro), ne estis monaĥejo, sed nur kaverno, en kiu loĝis izolita kaj pentofaris la sankta ermito *Juan de Artarès,* kiu antaŭ ol la araboj venis al Hispanujo, konstruis malriĉan ermitejon honore al S. Johano, la Baptisto.
La kanoniko de *Zaragozo, D-ro Juan Agustín Ramírez,* en sia verko „Vida de S. Lorenzo" (Vivo de S. Laŭrenco) certigas, ke en la jaro 1134 restis en *S. Johano de la Roko* la S. Kaliko de la Vespermanĝo, laŭ akto datumita la 14-an de decembro de tiu sama jaro, latine dirante: „En ebura kofro kuŝas la Kaliko, en kiu Jesuo Kristo konsekris sian Sangon, kiun sendis S. Laŭrenco al sia naskiĝurbo, Huesca." Tiu ĉi dokumento restis en la arkivejo de la monaĥejo kaj estis tradukata kaj kopiata de la nomita sinjoro Ramírez, kiel li mem asertas.

Daŭrigota.

NI GRATULAS

Nia jugoslava membro *Jarm Antun* ricevis la sanktan Ordinon je 6.3.1960 en la urbo *Dakovo* kaj du tagojn poste celebris la unuan sanktan Meson en sia naskiĝloko *Privlaka.* Niajn plej korajn bondezirojn al la nova sacerdoto; ni preĝos por ke la bona Dio benu la apostolan laboron de nia samideano. *
IKUE-ano Patro *P. Markvart ofm.cap.,* Poŝtkesto 125, *Bad Mergentheim,* Germanujo memorigos 17.4.60 la 25-an datrevenon de sia eniro en la kapucenan ordenon. La solenajn votojn li faris 24.4.39 kaj li ricevis la sanktan Ordinon je 19.3.41 dum soldata forpermeso. Ni preĝu, por ke Dio donu al nia kara samideano ankoraŭ multajn jarojn en bona sano kaj sukcesplena laboro.
Frato Arni Decorte, Instituto Sankta Kamilo, *Bierbeek, Belgujo,* festos la 23an de aprilo sian arĝentan reliĝian jubileon. Dum 15 jaroj li estas esperantisto, en kiu tempo li multege faris por propagandi nian movadon en sia Kongregacio kaj uzis reciproke Esperanton en la apostola laboro. Li restu sana kaj vigla dum ankoraŭ multaj jardekoj!

ĈE LA FONTO DE L' FELIĈO....

Okaze de Chopin-jaro 1960, S-ro Fr. Walas el Polujo atentigas la verdstelanojn ŝatantajn la muzikon de la granda komponisto, al letero de sac. Jelowicki pri la lastaj horoj de Chopin.

„...La novaĵo pri la proksimiĝanta morto de Frederiko Chopin, atingis min post mia reveno de Romo en Parizo. Mi kuris senprokraste al mia amiko de junaj jaroj, kies animo fariĝis de nun ankoraŭ pli kara. Ni ĉirkaŭbrakis unu la alian kaj niaj larmoj tuj aperis, montrantaj kion ni priploris.
Li mizeris kaj videble estingiĝadis... Tamen min li priploris, ne sian staton. Li bedaŭris la turmentan morton de mia frato Eduardo, kiun li ankaŭ ŝatis. Mi profitis tiun kortuŝon por memorigi lian patrinon... kaj dank' al tio, veki lian kredon, kiun ŝi instruis al li en lia junaĝo.
— Jes, mi komprenas — ekploris Chopin —. Mi ne volus morti sen la sanktaj Sakramentoj, por ke ne malĝoju mia amata patrino. Sed mi ne povas ilin akcepti, ĉar mi ne komprenas ilin laŭ via ideo. Jes, la dolĉon de la konfeso mi ankoraŭ komprenus kiel konfidon amikecan. Tamen la konfeson kiel sakramenton mi tute ne konceptas. Se vi volas, tiam pro amikeco mi konfesos al vi, sed aliel — ne.
Tiuj vortoj de Chopin elvokis en mia interno korpremon kaj mi tiam ekploris. Mi ege bedaŭris tiun amatan animon. Mi komencis ĝin kvazaŭ dorloti, kiel mi nur kapablis. Jen mi parolis pri la Sankta Virgulino, jen pri Nia Sinjoro, jen pri la plej ĉarmaj bildoj de la Dia Kompato... Nenio helpis.

chopin

Mi proponis al li venigon de ajna, de li elektita konfesprenonto. Finfine li respondis:
— Se mi iam volos konfesi, tiam certe nur al vi. Kaj ĝuste mi pleje timis tian disponon kaj decidon... post kiam mi aŭdis ĉion, kion li antaŭe pensis kaj diris pri la konfeso...
Pasis longaj, oftaj vizitoj, sed sen iu ajn rezulto. Mi tamen ne ĉesis preĝi kaj esperis, ke tiu animo ne pereos...
Iun tagon... vespere, alvokas min urĝe lia kuracisto, certigante, ke li ne kontas je tiu nokto. Tremante, pro emocio, mi aperis antaŭ la pordo de Chopin. La unuan fojon mi ne estis enlasita. Nur post kelkaj momentoj li enirigis min, sed nur por manpremi kaj diri: Mi amas vin ege, sed nenion al mi parolu. Iru — por dormi.
Kiu povas, imagu, kian nokton mi pasigis. La sekva tago estis tiu de Sankta Eduardo, patrono de mia amata, mortinta frato. Celebrante por lia animo la sanktan Meson mi tiel petis la Bonan Dion: Dio de kompato! Se la animo de mia frato Eduardo estas plaĉa al Vi, donacu al mi hodiaŭ la animon de Frederiko. Kun obligita zorgemo mi direktis je tiu tago miajn paŝojn al Chopin. Li ĝuste prenis sian matenmanĝon, al kiu li min invitis. Mi alparolis lin jene:
— Amiko mia kara. Hodiaŭ estas la patronfesto de mia frato Eduardo... Chopin respiris signifoplene kaj mi daŭrigis: En la festotago de mia frato prezentu al mi donacon.

— Mi donos ĉion, kion vi volos — respondis la artisto. Kaj mi ekpetis.:
— Donu al mi vian animon.
— Mi vin komprenas. Prenu ĝin — respondis Chopin kaj eksidis surlite.
Tiam ekposedis min nepriskribebla ĝojo, sed samtempe ekregis min granda timo. Kiamaniere preni tiun amatan animon por doni ĝin al Dio? Mi falis surgenuen kaj mi kriis enkore al Dio: Prenu ĝin, Vi mem.!
Kaj mi donis al Chopin Krucifikson, metante ĝin silente en liajn ambaŭ manojn. El niaj okuloj elfluis larmoj.
— Ĉu Vi kredas — mi demandis.
Li respondis: — Mi kredas.
— Kiel instruis Vin via Patrino?
— Jes, kiel instruis min... mia Patrino.
Kaj rigardante la Krucifikson en abundo de siaj larmoj, li komencis sian konfesadon... Poste li akceptis la Viatikon kaj la Lastan Sanktoleadon, kiun li mem petis...
Ek de tiu momento ŝanĝita per la Dia Graco, jes, per Dio mem — li fariĝis kvazaŭ alia homo, preskaŭ sanktulo...
Tiun tagon komencis la agonio de Chopin..... Pacienco, sindono al Dio kaj ofte ĝojo, akompanis lin ĝis la lasta spiro. Inter la plej grandaj doloroj li esprimadis sian feliĉon kaj dankis Dion esprimante sian amon al Li kune kun la soifo unuiĝi kun Li kiel eble plej baldaŭ. Kaj li rakontis pri sia feliĉo al ĉiuj, kiuj venis amike lin adiaŭi...
Proksimiĝis la momento, kiam li ne plu povis spiri. Ŝajnis, ke li finas. Ĝemoj liaj eksilentis. Li fariĝis senkonscia... Ĉiuj ĉeestantoj ektimis kaj ariĝis en lia ĉambro atendante la lastan spiron. Sed okazis alio. Chopin malfermis siajn okulojn kaj ekvidinte tiom da ĉirkaŭantoj li demandis: Kion ili faras? Kial ili ne preĝas?... Kaj tuj ĉiuj ekgenuis por preĝi, alvoki kun mi Ĉiujn Sanktulojn...
Tage kaj nokte Chopin tenis miajn manojn ne volante ilin forlasi. Ripetante: „Vi ne foriros de mi en tiu decida horo", li premis sin al mi kiel infano kutimas fari al patrino en atendata danĝero... Kaj oftiĝis liaj alvokoj: Jesuo, Maria... kaj la kruckisoj plenaj de kredo, espero kaj amo...
Kiam li estis sufiĉe forta por alparoli la ĉeestantojn, li ripetadis: „Mi amas Dion kaj la homojn. Estas bone, ke mi tiel mortas... Kara mia fratino — ne ploru. Ne ploru amikoj miaj. Mi antaŭsentas mian morton. Preĝu por mi... Ĝis revido enĉiele"...
Al la kuracistoj, kiuj penis daŭrigi en li la vivon li diris: Lasu min. Mi mortos. Dio jam pardonis al mi. Li vokas min al Si. Lasu min. Mi volas morti...
Kaj denove al la kuracistoj: „Ĉu bela estas tiu scienco, kiu plilongigas suferon? Se ĝi estus por io bona... por ia nobla afero... sed por suferigi min kaj tiujn kiujn mi amas!... Kia bela scienco!... Vi ege suferigas min — sed vane. Eble Vi eraris... Sed Dio ne eraris. Li min purigas. Ho, kiel bona estas Dio, ke li punas en tiu mondo. Ho, kiel bona estas Dio"...
En la agonia fino mem, Chopin ripetis ankoraŭ la plej dolĉajn nomojn de Jesuo, Maria, Jozefo, premis la Krucifikson sur la lipoj kaj sur sia koro por jam lastspire elparoli al ĉiuj la konsolajn vortojn: „Mi estas ĉe la fonto de l' feliĉo"... Kaj li mortis....."
Lia koro troviĝas en la preĝejo de la Sankta Kruco en Varsovio, kie multaj UK-partoprenintoj povis Lin omaĝi...

s. HP.

BAVARUJO,

lando de nia IVa Eŭkaristia Esperantista Mondkunveno

Neniu germana lando prezentas tian diversforman pejzaĝon kaj estas tiel riĉa je ĉiuspeca naturbeleco kiel Bavarujo. Kaj en neniu alia la aspekto de la urboj kaj vilaĝoj estas tiel multspeca, tiel reliefigita de historio kaj granda kultura pasinteco. La arkitekturo tiel harmonias kun la pejzaĝo, kvazaŭ ambaŭ estas kunkreskintaj. Oni povas tion ekkoni ekzemple ĉe niaj preĝejoj sur la kamparoj, en vilaĝoj, kiuj aspektas en la nordo de Bavarujo tute alie ol en la sudo, kie kreskas la bavaraj montoj.

En la nordo Franklando kaj Supra Palatino estas ĉirkaŭitaj de mezmontaroj. Ombraj, legendoriĉaj arbaroj kovras altaĵojn kaj deklivojn. Ruĝaj kaj flavaj grejsorokoj superas la riverojn, kiuj serpentas tra la montaroj. Antikvaj kavalirkasteloj kaj verde superkreskitaj ruinoj nestiĝis super la valoj, konstruitaj el la sama kolora ŝtono. Ruĝe kaj blankflave eklumas ankaŭ la preĝejoj el la mezepoka tegmentaro de la urboj. Monaĥejoj staras solaj sur la montetoj kaj en la arbaroj sin kaŝas antikvaj kasteloj. La valo de la rivero Majno lumas per helaj vitejoj. Unikaj konstruaĵoj de baroka arkitekturo pligrandigas la sorĉon de la natura beleco.



Munkeno — la Katedralo

La riverego Danubo fluas tra Bavarujo preter belegaj antikvaj urboj kaj katedraloj. De la suda bordo la lando malrapide leviĝas kontraŭ la Alpoj. Larĝaj lagoj kun kvietaj, kanplenaj golfetoj etendiĝas ĝis la piedoj de la montoj en verdaj valoj, borditaj de arbaroj. La impona fronto de la bavaraj kaj allgä-aj (algojaj) Alpoj limigas en la sudo panoramon reve belan. La helaj kalkaj rokoj de la bavaraj montarkernoj aspektas pli monstraj kaj imponaj ol la malhelaj Centraj Alpoj. Sovaĝaj fendegoj kun fluegantaj riveretoj kaj muĝantaj akvofaloj profunde tranĉis en la montegaron. Kiu surgrimpas la montajn suprojn aŭ kiu suprenveturas per ŝnurvagonoj, rigardas en la grandiozan netuŝitan belecon de montoj, abismoj kaj valoj, larĝaj dorsoj, turoj kaj akraj pintoj de la rokegaro. En la fono sude ekbrilas arĝente la plej altaj pintoj kun siaj glaciejoj kaj kun ĉiama neĝo.

Travojaĝante Bavarujon, oni ĝuas ne nur la plej belajn pejzaĝojn, samtempe oni veturas tra vivanta muzeo de germana kulturhistorio. Inter Majno kaj altmontaro ĉiu regiono prezentas konstruaĵojn laŭ diversaj okcidentaj artstiloj. Jen staras romanika katedralo kun belegaj frugotikaj skulptaĵoj super la sepmonteta episkopa urbo Bambergo. Spite de ĉiuj militaj detruoj Nurnbergo montras ankoraŭ la tutan riĉecon de malfru-mezepoka arto per siaj malfru-gotikaj preĝejoj kaj burĝaj domoj kaj per la kreaĵoj de la grandaj renesancaj skulptistoj Stoss,

Krafft kaj Vischer. La urbetoj Rothenburg kaj Dinkelsbühl, ĉirkaŭitaj per fortikaĵoj, kun turoj kaj pordegoj, ĉirkaŭataj per akvoplenaj fosaĵoj, prezentas al ni neŝanĝitan mezepokon de antaŭ duona jarmilo. En la Maksimilian-strato de Aŭgsburgo kun la magistrata domo, konstruita de Elias Holl, la germana renesanco perfektiĝis plej pure. La aspekto de la urbo Wurzburgo reliefis pro la baroko. En la salonoj kaj en la ĝardeno de la rezidejo, la plej pompa germana kastelo, estas aŭdata la festludoj de Mozart. Nenie oni komprenas la muzikon de Mozart pli bone ol meze de ĉi tiu arkitekturaĵo kiu estas kreita el la sama ideo. La bavara ĝoja katolikismo trovis sian plej trafan esprimon en la baroka kaj rokoka stiloj. En la valo de Majno kaj en la antaŭalpa regiono barokaj preĝejoj estas konstruitaj en la aperta pejzaĝo kiel valoraj juveloj. Munkeno estas ĉirkaŭita de ringo de barokaj preĝejoj kaj ĝi kaŝas en sia koro miraklon de kolora plastika mistiko, la Asam-preĝejon. La klasikismaj konstruaĵoj faritaj de reĝo Ludoviko I kun la malfru-gotikaj turoj de la „Frauenkirche" (preĝejo de nia Madono) donas la karakterizan aspekton al la urbo. Kvazaŭ ŝtoniĝintaj kulisoj por romantikaj operoj staras la kasteloj de la malfeliĉa reĝo Ludoviko II en la bavara montara regiono.

Munkeno, la ĉefurbo de la bela Bavarujo, inter la ĉefurboj de Eŭropo enhavas iom de Parizo, de Vieno, de Romo kaj de la Florenco, tamen ĝi estas pli proksime ĉe la fonto de la naturo ol tiuj urboj. Ĝi estas ankaŭ ne tiel ŝtona kaj ŝtala kiel aliaj mondcentroj, kies aspektojn formis la moderna tekniko.

Benediktanoj kreis kun la velfa duko Henriko la Leono la bazon por la bavara ĉefurbo ĉe la Izara valo, kie situis la vilaĝo *„Munihen"*, nomita laŭ la monaĥoj. La blazono de ĉi tiu urbo estas nigra-flava monaĥeto, kiu freŝdate ridas kiel ĉarma knabineto en la mondon. Jarcentoj helpis konstrui ĉi tie bonfarton kaj salutas hodiaŭ la vizitanton per la fieraj preĝejaj turoj, simboloj de kristana kredo, pro kiuj Munkeno estis nomita en la mezepoko la germana Romo.

Hans Bernhard.

JARLIBRO 1960

Ni sendis nur al membroj de IKUE resp. abonantoj de ESPERO KATOLIKA po unu ekzemplero senpage. Pluraj ekzempleroj, ankaŭ por ne-membroj, estas akireblaj ĉe nia Centra Oficejo en Dordrecht por 0,50 guld. (2 steloj aŭ 2 resp. kuponoj) afrankite.

Bonvolu noti la sekvantajn korektojn:

p. 16 *ANGLUJO* - Patrick Coveney forstreku kaj notu novan adreson:
IRLANDO - Patrick Coveney, Coláiste Bharra, Fearann Phiarais, *Corcaigh.*
p. 18 *GERMANUJO* - Joh. Reifen ktp. legu: Joseph Reisen, dekano kaj ĉefepiskopa konsilisto h.c.
H. Zimmerer, *Oberzier:* forstreku, ĉar intertempe mortis.
p. 19 *ITALUJO* - *Patro Narciso* Cecchitelli - legu: *Frato Carlo.* Evidentiĝas ke li estas kleriko, kiu esperas ricevi la sanktan Ordinon en 1961.
p. 51 - *LIBROLISTO:* Lingvo kaj Vivo, broŝ. 13,— anstataŭ 12,—.
kaj aldonojn:
p. 24 *AŬSTRUJO* - *Eisenstadt* (Burgenland):
S-ro Otto Mongold, Landa kalkul-direktoro, Landhaus III/13.
p. 25 *BELGUJO* - *Roeselare:*
Frato Basilianus, De Zilten 52, edukado, instruado, muzikpedagogio.
p. 29 *GERMANUJO* - *Stolberg-Rhld.* - 22c - (37000).
S-ro Hans Siffrin, Muzikinstruisto, Krausstr. 1, tel. 2620. Sama adreso por loka grupo.

NIA ANTAŬSINODA AGADO.

Alproksimiĝas la forsendotempo de projektoj kaj proponoj por la Universala Sinodo al la S. Kongregacioj en Romo.

Por nia IKUE-movado unika ŝanco por oferti al la sankta Eklezio, kiu celas unuigi diversajn kristanajn konfesiojn, la maturan lingvon de D-ro Zamenhof. Esperanto, kiel mondlingvo, povas ludi la rolon de la iama greka lingvo en la tempoj de la Apostoloj. La unikeco de Esperanto ne bezonas pruvojn. Sufiĉas proponi ĝin al la Sinodo. Hierarĥiuloj: kardinaloj, episkopoj kaj sacerdotoj scios honorigi nian projekton, kiun akompanu preĝoj al nia Sankta Pio X, je intenco de nia venkenda afero. Se ni ne sukcesos, tiam denove dekoj da jaroj pasos ĝis simila okazo prezentos sin. Ni ne forgesu, ke la dumiljaraj ideoj de frateco kaj paco en la Eklezio krias por internacia zamenhofa lingvosolvo.

La fakto mem, ke la IKUE-anaro kun ĉiuj katolikaj esperantistoj, organizitaj kaj neorganizitaj, proponas similan aferon al la Eklezia Sinodo, venkigos kaj realigos rapide la celojn de nia IKUE-movado.

IKUE-anoj priparolu ĉi tiun alvokon kun al ili konataj sinodontoj. Gajnu katolikajn altlernejojn, kiuj povas sendi proponojn al la venonta Sinodo. Ekagu, kiel antaŭ la Unesko-Konferenco en Montevideo!

En la nomo de PKUE:
sac. H. Paruzel.

Itamar Even-Zohar: Marĝenaj Bibliaĵoj
G. Waringhien: Respondo al Even-Zohar
I. Even-Zohar: Komento
en: Franca Esperantisto, 1959, 70-71.

Andreo Albault, *G. Waringhien*, *Paul Ciliga*: Unua kaj Universala Vortaroj. en: Franca Esperantisto, 1959, 72-73.

Paul Ciliga: Redakcia Suplemento al recenzo de Andreo Albault Pri: I. Lapenna, Retoriko, 2a eld.
en: Franca Esperantisto, 1959,92.

G. Waringhien: Zamenhof Lazaro Ludoviko en: Esperanto U.E.A., 1959, 202-205.
L. L. Zamenhof: Letero. id. p. 213.
W. E. Collinson: La valoro de Esperanto el lingvistika vidpunkto. id. p. 215-216.

UNUECA TEKSTO DE LA ĈEFAJ PREĜOJ 2

Ave Maria

La historio de ĉi tiu teksto estas iom pli simpla ol tiu de la Patro Nia, ĉar nek la Zamenhofa literaturo nek la nekatolikaj Kristanoj posedas ĝin; ĝi estas pure katolika.

Tamen la diverseco inter la ekzistantaj tekstoj estas sufiĉe granda! Jam Jozefo Linŭl, parohestro en Pfakofen apud Regensburgo, Germ., kiu detale studis pri nia temo kaj verkis jam en 1914 kaj 1922, en sia lasta studo (E.K. 1937, 93) skribas: „Antaŭ mi kuŝas 8 (ok!) diversaj katolikaj preĝlibroj aŭ libretoj, kaj ĉiu alie tradukas la ĉefajn preĝojn, eĉ du preĝaroj de la sama aŭtoro tradukas ilin malsame.!"

Hodiaŭ sur mia skribotablo troviĝas 13 diversaj tekstoj de la Ave Maria! Unuavide tio ŝajnas granda ĥaoso, feliĉe tamen ne tiel estas. Kontraŭe, montriĝas la konstanta zorgo por pli ĝuste kaj pli integre redoni en nia lingvo la altvaloran enhavon de ĉi tiu preĝo.
Jen ni publikigas la du tradukojn de L. de Beaufront el 1893 kaj 1902 (I kaj II) kaj indikas la plibonigojn. E. Peltier proponas: *Saluton* kaj *graco-plena*. Patro Polikarpo: *Maria*. Patro Modesto Carolfi: *benata vi estas*. La unueca teksto de 1924 feliĉe kolektas multajn plibonigojn, sed bedaŭrinde ankoraŭ uzas *Mario* (VI). En 1929 G. Ramboux pli ĝuste skribas: *por ni, pekuloj,*.
En IX ni donas novan proponon kaj aldonas juĝon pri kelkaj detaloj.

I

Mi Vin salutas,
Mario,
plena je favoroj,
la Sinjoro
estas kun Vi;
Vi estas benata
inter ĉiuj virinoj,
kaj estas benata
la frukto de Via ventro
Jezu.
Sankta Mario,
Dipatrino,
preĝadu por ni pekuloj,
nun kaj en la horo
de nia morta.
Amen.
L. de Beaufront, 1893

II

Mi *vin* salutas,
Mario,
plena je favoroj,
la Sinjoro
estas kun *vi*;
vi estas benata
inter *la* virinoj,
kaj estas benata
la frukto de *via* ventro
Jesuo.
Sankta Mario,
Dipatrino,
preĝu por ni pekuloj,
nun kaj en la horo
de nia *morto*.
Amen.
L. de Beaufront, 1902

VI

Saluton,
Mario,
gracoplena;
la Sinjoro
estas kun vi;
benata vi estas
inter la virinoj,
kaj benata estas
la frukto de via korpo,
Jesuo.
Sankta Mario,
Dipatrino,
preĝu por ni pekuloj,
nun kaj en la horo
de nia morto.
Amen.
F. Meŝtan, 1924

III

Saluton,
graco-plena;
kaj benata estas
la frukto de via karno
E. Peltier, 1907

IV

Maria,
gracoplena,
Jezu.
Sankta Maria,
P-ro Polikarpo, 1911

IX

Ave
Maria,
plena de graco.
La Sinjoro
estas kun vi.
Benata vi estas
inter la virinoj.
Kaj estas benata
la frukto de via sino,
Jesuo.
Sankta Maria,
Patrino de Dio.
Preĝu por ni, pekuloj,
nun kaj en la horo
de nia morto.
Amen.

V

plena de favoro
la frukto de via korpo
Patrino de Dio
Fr. Clemente, 1913

VII

benata vi estas
la frukto de via ventro

P-ro M. Carolfi, 1922

VIII

vi estas benata
la frukto de via karno
preĝu por ni, pekuloj,
G. Ramboux, 1929

Kelkaj detaloj ĝis nun restis nematuraj.
1) *Saluton,* proponita de E. Peltier estas sufiĉe ĝenerale uzata. En la aprila nro. de „Blanka Kruco", 1920 sacerdoto Becker el Bamberg, Polujo, jam donis plurajn proponojn pri unueca teksto de niaj ĉefaj preĝoj. J. Schröder el Vieno represas tiujn proponojn en EK 1920, 66-68. B. proponas: *Ave Maria,* kaj J.S. aldonas: „La akcepto de *Ave* ŝajnas al mi tute aprobinda; modela ekzemplo por tio estas la de D-ro Zamenhof mem akceptita por la lingvo: Amen."
Same Jozefo Lintl en EK 1922, 203: ĉu la saluto „Ave Maria" ne estas jam internacia esprimo, almenaŭ por la tuta katolikaro? En la... Esperanta poezio mi ne malofte legis la saluton „Ave Maria"... Se oni permesas en poezio diri „Ave Maria", kial ne ankaŭ en prozo?... Mi timas, ke la esprimo „Saluton Maria" postulos longan tempon por sia hejmiĝo, supozite ke ĝi iam hejmiĝos."
2) *Plena je favoroj* certe ne plaĉas. Ĉu *gracoplena* estas la plej bona solvo? Francesko de Paŭla Clemente proponis: *plena de favoro.* Estas plibonigo, ke li evitas *je.* Ĉu *plena de graco* ne kunigas ambaŭ plibonigojn? Jam en 1920 J. Schröder skribis: Pro..., plia soleneco mi preferus: *plena de graco* anst. *gracoplena.*
3) Same jam en 1913 Fr. de P. Clemente proponis: *Patrino de Dio* anst. *Dipatrino.* Patro M. Carolfi lin sekvas en 1931 kaj en 1948. Efektive *Patrino de Dio* sonas pli solene; la vorto *Dio* jam estas tiel mallonga, ke ĝi ne facile kiel radiko estas uzata. Pro tio la radiko *Di'* ne ŝajnas taŭga por ofta uzo en poezio, kaj speciale ne kiel rimvorto! Ni prefere uzu la vorton *Dio* en ĝia pleneco.
4) *ventro — karno — korpo — sino — utero.* Jen la kvinopo, kiu montras la necertecon en la traduko de unu el la pli delikataj punktoj de niaj ĉefaj preĝoj. Ne temas pri detalo nur en la Ave Maria a), ĝi krome troviĝas en la himno Ave Reĝino b), en la Litanio de la plej Sankta Koro de Jesuo c), kaj en la Tedeumo d). Unue ni donu la latinajn tekstojn:
a) Et benedictus fructus *ventris* tui, Jesus.
b) Et Jesum, benedictum fructum *ventris* tui, nobis post hoc exilium ostende.
c) Cor Jesu, in *sinu* Virginis Matris a Spiritu Sancto formatum.
d) Tu ad liberandum suscepturum hominem, non horruisti Virginis *uterum.*
Ĉiuj 13 preĝlibroj posedas tradukojn de a); 7 de b); 5 de c); 3 de d). Nur Migrukunmi de Fr. Clemente, Katolika Preĝlibro de M. Carolfi (1-a eld. 1922) kaj Tutmonda Laŭdo posedas la kvar tekstojn. Fr. Clemente eĉ ĉiujn kvar terminojn uzas: a) korpo; b) karno; c) ventro; d) sinon! M. Carolfi uzas: a) b) c) ventro; d) utero. En postaj eldonoj M. Carolfi tamen uzas: 1931 a) korpo; 1948 a) c) sino.
Por kompletigi la rezulton de nia esploro ni indiku la oftecon de ĉiu termino:
a) ventro 4, karno 3, korpo 4, sino 2; c) ventro 3, sino 2.
b) ventro 1, kar no 1, korpo 4, sino 1; d) utero 1, sino 2.
En la plej malnovaj eldonoj oni pli uzas: ventro; poste: korpo. Niaopinie la terminoj *korpo* kaj *karno* estas tro malprecizaj; *ventro* kaj *utero* akcentas tro la biologian funkcion; nur *sino* indikas kune la homan kaj la biologian funkciojn, sed unue la homan karakteron de la patrineco kaj nur oblikve la biologian funkcion. Kp *sino* en PV. Tial *sino* ŝajnas la plej preferinda termino.
Jen la tradukoj en Tutmonda Laŭdo:
a) Kaj benata estas la frukto de via sino, Jesuo.
b) Kaj montru al ni post ĉi tiu ekzilo Jesuon, la benatan frukton de via sino.
c) Koro de Jesuo, de la Sankta Spirito formita en la sino de la virga Patrino.

d) Vi por liberigi la homon ne timis Virgulinan sinon.
Pli larĝan intereson posedas nia temo, pro tio ke pluraj tekstoj en la Nova Testamento enhavas la saman terminon! Vidu: Lk 1,31, 41, 42, 44; 11,27; 16,22, 23; Jo 1,18; 3,4; 7,38.
Kie temas pri indiko de la patrineco aŭ pri la homa internaĵo ĝenerale kiel en Jo 7,38, la Brita eldono de la Biblio ĉiam uzas *ventro*. Pri Lazaro estas rakontata, ke li estas en la *sino* de Abrahamo, Lk 16, 22-23.
Specialan atenton meritas Jo 1,18, kie pri la Vorto de Dio estas atestata: „kiu estas en la *sino* de la Patro". Tiu ĉi intima rilato inter la Patro kaj la Filo estas senfine pli granda ol tiu inter Abrahamo kaj Lazaro: la Filo ja eterne vivas en la Patro, kun kiu Li estas perfekte unu.
Tiel ni ankaŭ prave diras, ke persono kiu ricevas la sanktan Bapton, estas akceptata en la sinon de la Eklezio, nia patrino. Do ankaŭ pro tiuj lingvaj rilatoj la termino *sino* ŝajnas preferinda.
daŭrigota. H. G. Wannemakers. S. J.

STRANGE !

En klubejo de oficiroj kapitano rakontas, ke en ties kazerno estas soldato, kiu kapablas formanĝi en kvaronhoro 6 panojn po unu kilogramo, sen butero aŭ alia „ornamo". Majoro ne volas kredi tion kaj vetas ke tio ne estas ebla. La kapitano telefonas al la kazerno kaj ordonas al serĝento, ke li venigu tiun soldaton. Intertempe oni sendis alian soldaton por alporti ses panojn, kaj la spektaklo povis komenciĝi. La manĝemulo rapide formanĝas kvar panojn, sed ek de la kvina lia apetito ŝajne estas for kaj nur malrapide unu panpeco post la alia malaperas. Por la sesa pano li uzas tranĉilon, unue tranĉas la panon en du, poste en ĉiam pli multajn pecojn, sed kiam proksimume kvarono de la pano restas, la soldato profunde spiras kaj asertas ke lia stomako estas plenplenega kaj ne plu akceptas ion.
— Jen — konstatas la majoro — li do ne povas tute formanĝi 6 panojn!
— Strange! — diras la akompananta serĝento. — Ĵus antaŭ la kapitano telefonis, la soldato tamen formanĝis 6 panojn en dek minutoj!

Literenigmo

Skribu sur papero la ciferojn 1 ĝis 33.
Serĉu vorton laŭ la priskribo kaj skribu la literojn sub la ciferoj. Oni tiam legos proverbon.

1.	3.	13.	30.	18.	=	metalo.
15.	2.	28.	26.	14.	=	ornamaĵo.
16.	32.	20.	24.		=	promenejo.
23.	31.	25.	11.	33.	=	laboro
17.	9.	22.	8.	24.	=	tabelo
19.	5.	7.	23.	33.	=	loĝejo de birdoj
10.	27.	13.	12.		=	orda numeralo.
13.	29.	15.	6.	2.	=	perdi la vivon per akcidenta morto.
1.	12.	8.	21.	4.	14 =	ĉeno por malliberigi krimulon.

Li de Jong-Roobeek.

LA ANTIKVA ARTO EN LA REGIONO BAGES *

LA KRISTO DE MANRESO

La statuarto, preskaŭ ne ekzistanta dum la karolida epoko, aperas je la fino de la deka jarcento sur relikvujoj, kiuj ricevis kulton, ne pro la skulptita bildo, sed pro la relikvoj. Poste la fervoro de la kredantoj centriĝis precipe en la bildoj de Kristo krucumita kaj de la Virgulino Maria, kun aŭ sen relikvoj. Tiu pieco havis grandan disvastigadon ek de la dekdua jarcento.

La romanikaj artaĵoj pri Kristo apartenas precipe al du specoj: unu estas la „Majesto", kiu originas el Sirio. Ĝi montras Kriston vestitan per longa tuniko, ne suferantan, sen doloraj trajtoj. La kruco ne estas kaŭzo de doloro, sed kontraŭe trono de la Dia Filo, triumfinta sur la morto. La alia speco estas tiu de la Homo krucumita, nuda, vere pendanta al la najlegoj, kiuj fiksas Lin sur la lignaĵo. Tiu ĉi dua tipo havas pli grandan disvastiĝon en la okcidento, tiel ke ĝi dum la dektria jarcento forpelis la unuan el la pirenea lando.

En nia manresa regiono ne estas konservita ekzemplero de la romanikaj „Majestoj", nek spuro, ke iam ekzistis unu el ili.

La katedralo „Sankta Maria" de Manreso tamen posedas belegan skulpton de nuda Kristo. Ĝi estas trovita jam antaŭ multaj jaroj, en malantaŭa parto de altaro, kie oni eble metis ĝin ĉar ĝi ne plu inspiris piecon.

La bildo, sen la kruco — kiu estas novkonstruita — estas alta 100 cm kaj larĝa 95 cm. La Savanto aperas mortinta, kun la kapo klinita antaŭen kaj iomete al la dekstra flanko, ne havanta kronon, konforme al la plej antikvaj bildoj: nur iom poste oni surmetis la reĝan kronon, kaj pli malfrue la dornkronon. La hararo estas dividita en la mezo kaj kuŝas ambaŭflanke kun grandaj ondoj. La barbo estas tre mallonga kaj montras etajn simetriajn frizojn. *(Vidu la foton sur la kovrilo — Red.)*

Malgraŭ la akra stiligado, la statuo prezentas anatomian realismon, sen troa rigideco en brakoj kaj kruroj. La vizaĝo esprimas la kvieton de la morto. La Savanto estas fiksita sur la kruco per kvar najlegoj, tio estas kun la piedoj tranajligitaj unu flanke de la alia, laŭ kutimo de tiu epoko. Zono metita iom sub la talio subtenas simplan zontukon ete faldita, kiu atingas la genuojn kaj reliefiĝas, pendante antaŭe kaj malantaŭe el la zono.

La figuro de la krucumita Kristo estas polikromitaĵo: la korpo posedas la naturan koloron de la haŭto: la haroj kun nigraj strioj akcentas la ondumadon de la skulptarto, ili finas en spiraloj sur Lia brusto, nur ili estas pentritaj; la zontuko havas alterne blankajn kaj bluajn striojn, tiuj ĉi kun ruĝaj trifolioj.

Pro la karakteraĵoj de tiu ĉi manresa bildo oni povas konkludi, ke ĝi originas el la mezo de la dekdua jarcento.

El la revuo BAGES, Manreso. T.E.F. LINGUA CLUB.

**) BAGES estas regiono iomete ebena, kies ĉefurbo estas Manreso (Hispanujo).*

LA ESTRARO DE I.K.U.E. KAJ REDAKCIO DE E. K.

DEZIRAS AL VI GRACOPLENAN PASKOFESTON!

ESPERANTO VIVAS.

HISPANUJO. De la 28-a Internacia Specimena Foiro de Barcelona ni ricevis du seskolorajn afiŝojn (100 x 70 cm kaj 30 x 20 cm) kun teksto en Esperanto.
La fakto ke unu el plej grandaj internaciaj foiroj, kiu ĉi-jare okazos de 1 - 20.6., uzas Esperanton, atestas ke nia lingvo penetris en la komercon. Petu la afiŝojn senpagajn, prefere uzante komercan leterpaperon, ĉe: 28-a Specimena Foiro, Paseo de Maria Cristina, *Barcelona 4.* *

FRANCUJO. La franca IKUE-sekcio havis sian jarkunvenon 6.3.60 en *Parizo.* Oni konstatis kreskon de la membronombro en la pasinta jaro kaj multflankan agadon, ekz. estis fondata libro-klubo, kies membroj povas prunti librojn por malalta kotizo; aperis propagandaj artikoloj en diversaj gazetoj; estas sendita letero kun dokumentaro pri la utilo de Esperanto al diversaj instancoj, kaj Franca Katolika Ligo faris kontrakton kun la Franca Esperantista Unuiĝo pri kunlaborado. Por la estonto estas diversaj planoj: la prepara studo por franca numero de *Espero Katolika;* la eldono de biografio pri *Pastro Peltier,* la fondinto de nia revuo.

POLLANDO. Antaŭ unu jaro estis fondata katolika Esperanto-Grupo en *Zabrze,* konsistanta el kelkaj gejunuloj kiuj fervore lernis nian lingvon. Post la 44-a U.K. en Varsovio paroĥa sacerdoto-junulargvidanto ekinteresiĝis pri nia movado kaj petis al nia fervora membro, s-ro *Frederiko Widera* (sur la foto la dua de maldekstre, kun okulvitroj) gvidi kurson en la junulargrupo. Partoprenis ĝin ĉ. 30 gejunuloj. La 5-an de januari ili aranĝis Kristnask-vesperon; ili kantis kaj deklamis, faris demandludon kaj aliajn distraĵojn, ĉio okazis en Esperanto. Krom la sacerdoto ĉeestis dentkuracistino, 3 geinstruistoj kaj multaj gejunuloj el diversaj mezgradaj- kaj faklernejoj. Ili volonte volas korespondi kun alilandaj samideanoj. Adreso: S-ro *Frederiko Widera,* Trocera 32, b.m. 9, *Zabrze,* woj. Katowice, *Pollando.*

La pola pentristino Helena Zawisza Sobolewska el Stetino, fervora IKUE-membro, faris karbodesegnon por afiŝo okaze de la centa naskiĝdato de D-ro Zamenhof. Inter la revuoj estas Espero Katolika -maldekste-.

FILATELIO.

ĈEĤOSLOVAKUJO. Okaze de la 100-jara ekzisto de la *Ŝkoda fabrikoj* aperis serio (4 p.m.) el kiu estas menciinda: 1 Kcs., blue griza, preĝejo de Sta. Bartolomeo en *Pilsen.*

VATIKANO. Ankaŭ eldonis serion memore de la Kontrakto de Laterano, nome: 30 L. bruna kaj 100 L. blua. Sur ambaŭ p.m. la portreto de Lia Papa Moŝto Pio XI laŭ skizo de Grasellini.

— Kronado de Lia Papa Moŝto Johano XXIII:
25 L. kaj 60 L.: portreto de la Papo.
35 L. kaj 100 L.: la papa blazono.

— Serio „Martiroj":
15 L., ruĝa: Sta. Laŭrenco / 25 L., siringviola: Sta. Siksto / 50 L., verde blua: Sta. Agapito / 60 L., bronzverda: Sta. Felicisimo / 100 L., bruna: Sta. Cypriano / 300 L., okrokolora: Sta. Fruktuoso.

Antaŭ ol Cypriano konvertiĝis li estis advokato en Kartago. Li fariĝis sacerdoto kaj poste episkopo de tiu urbo. Sta. Hieronimo atestas pri tiu ĉi eklezia doktoro: „Estas superflue paroli pri lia grandeco, ĉar liaj verkoj estas pli klaraj ol la suno". Li mortis la 14-an de septembro 258. Li estis entombigata en Kartago, nun lia korpo kuŝas en Liono.

Sta. Fruktuoso estis episkopo de Tarragona. La 16-an de januaro 259 li estis arestata laŭ dekreto de la imperiestro Decio Valeriano. Oni postulis de li, ke li ĵure forlasu sian episkopan oficon, sed li rifuzis. Pro tio li estis kondamnata je la brulŝtiparo la 21-an de januaro 259.

BELGUJO. Du p.m. kun portreto de Papo Adriano VI. Maldekstre la blazono de la Papo. 2.50 fr., ruĝa kaj 5 fr., blue verda. Naskiĝis en Utreĥto 2-3-1459, mortis en Romo 14-9-1523.

BRAZILO. Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Dom J. S. de Souza aperis p.m. kun lia portreto: Cr. 2.50, bruna. Naskiĝis en Miguel de Picacicaba (1859), mortis la 30-an de aŭgusto 1932. Episkopo, poste ĉefepiskopo en Minas Gerais.

EKVADORO. Unu jaron post la morto de Lia Papa Moŝto Pio XII aperis aermarko kun bildo de la Papo: 1.30 Sucre.

— Krome aperis 5 p.m. kun bildoj de la Dipatrino, „Patronino de Quito": 5 ct. verda / 10 ct. bruna / 20 ct. violblua / 30 ct. blua / 80 ct. karmina.

— Je la 150-jara datreveno de la aŭtonomio aperis serio (6 valoroj) el kiu estas taŭgaj por nia kolekto:
20 cts., blua kaj okrokolora: kapelo apud la palaco de Manuelo Canizarès;
80 cts., blua, sepikolora kaj oranĝkolora: kanonikarsalono de la monaĥejo Sta. Aŭgusteno.

GVATEMALO. La p.m. el la serio de 1952, 4 ct., no 358, oranĝkolora, nun aperis en alia koloro (blua). Bildo: Monsinjoro Payo Enriquez de Rivera, episkopo de Gvatemalo. Li naskiĝis en 1612 en Hispanujo. Kiel misiisto li en 1660 iris al Gvatemalo, kie li mortis en 1685.

HUNGARUJO. El la serio aermarkoj ni mencias: 20 f. verda, bildo: la preĝejo kaj la estinta abatejo de Tihany apud la Balatonlago. La konstruaĵoj, kiuj

→

Jen, karaj legantoj, rubriko al kiu vi ĉiuj povos kunlabori.

La intenco de ĉi tiu rubriko estas: *per la faktoj* fari propagandon por internacia lingvo, do por Esperanto. Kion ni devos fari estas nur: publike indiki historietojn, faktojn, eldiraĵojn k.t.p., kiuj demonstras ke en tiuj okazoj lingvo internacia (do: Esperanto) estus eliminta multajn malfacilaĵojn.

Ĉi sube mi donos kelkajn ekzemplojn; el la plej nova kiel ankaŭ el la malnova tempo mi jam kolektis, enskribante kaj engluante, sufiĉe grandan arsenalon el kiu mi tiucele povos ĉerpi. Mi tamen estas certa ke vi en viaj landoj nur iomete atentante havos abundon da faktoj utilaj por nia afero. Konsente kun nia ĉefredaktorino mi petas vin sendi al mia adreso tiajn interesaĵojn; nur estos necese 1) ke la faktoj estas veraj; 2) ke oni indiku la fonton de la novaĵo, daton k.t.p.; 3) ke oni subskribu per sia nomo (se vi ne volas konigi vian nomon en E.K. vi tion bonvolu al mi sciigi). La gazetoj, ĵurnaloj k.t.p. el kiuj mi mem laŭeble ĉerpas estas (ĉiuj el Nederlando) *Volkskrant, Tijd-Maasbode, Leidse Courant, Linie*; ne gravas tamen se ankaŭ vi trovos ion en la samaj gazetoj; ĉar mi povos esti pretervidinta ion.

Do jen el plej nova tempo du okazintaĵoj (ekde nun ĉiuj estos sinsekve numerataj):

1. *Lingvaj malfacilaĵoj en Squaw Valley.*

La olimpaj interpretistoj estis atendataj en Squaw Valley samtempe kun la partoprenontoj; pro tio la oficistoj en la olimpa pres-centro ne malmulte sin ĝenis, kiam (hieraŭ) alvenis japana raportisto, kiu ne komprenis eĉ unu anglan vorton. Donu konsilon kiu povus, ĉar ankaŭ al mimiko kaj gestoj ne reagis la modeste ridetanta japano. Finfine oni trovis solvon: oni mendis telefonan konversacion kun... San Francisko, kie troviĝas aviada entrepreno. Interparolado je 400 km.-distanco sekvis kaj kombinante tri telefonilojn la komitato povis informiĝi pri la deziroj de gasto, kiu apenaŭ du metrojn de ili staris en la telefonejo. *(Leidse Courant, Nederl. 3 febr. '60).*

2. *Ankoraŭfoje Squaw Valley.*

La problemon de la lingvoj — ĉar ia(!) konfuzo de lingvoj ja ekzistos — oni *esperas* (ne per...Esperanto! *C.A.O.)* venki envicigante studentojn teologajn kaj seminaristojn. Ankaŭ oni apelaciis al sacerdotoj kaj pastoroj kiuj konas plurajn lingvojn. *(Tijd-Maasbode, Nederl. 18 febr. '60)*

Komentario superflua! Unu lingvo internacia jam ekzistanta, nome Esperanto, flanke de propra solvus ĉiujn malfacilaĵojn kaj... kostojn (vidu 1).

Sendu viajn novaĵojn al parohestro *C. A. Ouwendijk, Rijpwetering, Nederlando.*

P.S. Si vi volas bone prononci mian, tute ne esperantan, nomon, jen: Kornelio Adriano *Aŭ*endejk el Rejp*wé*tering (kursivo havas akcenton).

---

sin trovas sur duoninsulo sur altaĵo 83 metrojn alta, datiĝas el 1055, fonditaj de reĝo Andreo I-a.

ITALUJO. La valoro 110 L., bruna kaj flava, el la serio „Olimpiado", prezentas la Bazilikon de Massenzio.

J. S. Jansen.

RADIO VARSOVIO: elsendas *ĉiutage* de 16.30 - 17.00 je mallongaj ondoj: 25.39 - 30.98 - 31.45 - 31.50 - 41.12 - 42.11 - 50.21 m. kaj je mezlonga ondo 249 m. La programoj estas tre variaj!
Adreso: Pola Radio, ul. Noakowskiego 24, Warszawa, Pollando.

RADIO ROMA Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).

La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).
Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96,
Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA; merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

APRILO 1960.

1: La itala kanzonkantisto Fred Buscaglione; 5: Tra la literaturo; 6: Kuriero de Esperanto; 8: Leterkesto kaj bibliografio; 12 Novaĵoj el Italujo; 13: Kuriero de Esperanto; 15: La Sankta Vendredo; 19: Italaj kanzonoj en Esperanto; 20: Kuriero de Esperanto; 22: Romaj ĉefbazilikoj: Sankta Paŭlo; 26: Italaj regionoj: Lukanio; 27: Kuriero de Esperanto; 29: La itala blinda skulptisto Ernesto Masuelli.

ESPERANTO-PROGRAMOJ DE LA VOĈO DE AMERIKO, 8-15 Aprilo 1960

1100-1130 GMT	(Greenwich-horo)	41.90 metroj	7160 kilocikloj
1200-1230 GMT	(Greenwich-horo)	19.72 metroj	15210 kilocikloj
2200-2230 GMT	(Greenwich-horo)	31.28 metroj	9590 kilocikloj
		31.01 metroj	9675 kilocikloj

Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko

8 Aprilo: S-ro Karl-Olof Sandgren, Svedujo, kaj S-ro Hans Jakob, Svisujo: Kial ne ekzistas grava Socialdemokrata Partio en Usono?
S-ro Philip Ogwuazor, Nigerio, kaj S-ro Naokazu Kawasaki, Japanujo: Kial kelkaj personoj timas, ke katoliko povus fariĝi Prezidanto de Usono?
Jos Derks, Monako: Kiel loĝas usona laboristo? Ĉu li povas posedi propran domon?
D-ro J. Kondor, Germanujo: Kiel usona laboristo pasigas sian libertempon? Ĉu li havas okazon vojaĝi eksterlande?

15 Aprilo: Urbestro Franz Jonas de Vieno: La urbo Washington ne decidas pri sia budĝeto kaj ne havas urbestron kiel aliaj urboj. Kiaj estas la konstituciaj kaj leĝaj bazoj por tio?
D-ro Willem Drees, iama Nederlanda Ĉefministro: Demando pri la diferenco inter la Prezidanta Sistemo ekzistanta en Usono kaj la Parlamenta Sistemo en Eŭropo; ĉu usonanoj ankoraŭ kredas, ke ilia sistemo, kiu kaŭzas kelkfoje malfacilaĵojn, estas preferinda?
S-ro Einar Dahl, Membro de la Unua Ĉambro (Senato) de la Sveda Parlamento: Virinoj en la Usona Parlamento.

La enhavo de la programoj ankoraŭ povas esti iomete ŝanĝata.